Al s-ro prof. G. Peano en Torino

Estimata Sinjoro

Mi petas pardonon pro skribo en Esperanto, sed bedaŭrinde mi nek havas tempon nek eblon profundiĝi en la praktika uzo de Nov-latinaj sistemoj.

Mi esperas ke Esperanton vi tamen bone komprenas, ~~kaj~~ same kiel la leterojn en interlingua — mi komprenas.

Mi estus al vi tre dankema, se vi povus sendi al mi la librojn, notitajn, kiujn bedaŭrinde mi ne havas en mia biblioteko mondlingva (3600 volumoj).

Pri la elspezoj — ilin mi senprokraste repagos ĉu per s-ro E Wahl ĉu per mia agento-korespondanto en Leipzig.

Per la sama posto mi sendas al vi 2 ekzemplerojn de mia libro pri la historio de la lingvo universala. Ĝi estas en la rusa lingvo unua libro pri tiu temo.

Kun saluto kaj estimo

Via E. Drezen

membro de A.p.I.

Moskvo
16-XI-25 ricevuto il 22,
R. 24 colle pubblicazioni